



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 239

Marto, 2006

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — kompostisto  
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto  
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:  
Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

### *Bona sano per energispegulo*

Homan sanon postkuras tra la jarmiloj multaj el la plej elstaraj pensuloj en la historio de la homaro. En Azio, ĝi iĝis ĉefa studtemo de kuracistoj, dum en Eŭropo kaj Ameriko kuracistaj universitatoj apenaŭ agnoskas la ekziston de la temo. Ilia ĉefa studtemo estas *malsanoj*, tute alia afero ol sano.

Ĉu estas mirige, ke preskaŭ neniuj en nia (Eŭrop-amerika) socio pensas pri sano kiel io konkreta, anstataŭ nur la manko de malsano? Se oni bezonas detalan planon antaŭ ol konstrui bonan domon, kiel eblas konstrui bonan sanon sen eĉ klara imago pri kio ĝi estas? La farto de miliardoj da homoj atestas ke nur batali kontraŭ malsanoj ne sufiĉas por konstrui bonan sanon.

Por ajna ampleksa konstruprojekto, necesas detala plano. Senplane oni ne aŭdacus komenci konstrui jetaviadilon, grandan ponton, cent-etaĝan oficejaron, aŭ eĉ etan muzikportilon *iPod*. Kiel do konstrui sanan homan korpon, multege pli delikatan kaj kompleksan ol ajna projekto de inĝeniero? Feliĉe, la planoj jam ekzistas. Ĉiu ĉelo en via korpo entenas kompletan detalan planon por via tuta korpo, tia kia ĝi estis origine intencita: perfekte sana. La problemo estas, ke ĝis nun homoj ne kapablas legi tiujn planojn kaj uzi ilin por rekonstrui sian korpon.

Feliĉe, ne necesas al homo legi tiujn planojn por utiligi ilin. Tomatosemo same havas la kompletan planon por tomata planto kiu produktas tomatfruktojn kaj pliajn semojn. Sed se oni lasas la semon sur tablo, ĝi neniam utiligos tiujn planojn por kreski en maturan planton. Krom plano, ĝi bezonas ankaŭ taŭgan medion. Simile, homa ĉelo bezonas taŭgan medion por povi legi sian internan planon kaj uzi ĝin por la perfekta rekonstruo de la organismo.

Kvantuma fiziko montras, ke materio en realo ne ekzistas, escepte kiam ni ĝin rigardas. Tuj kiam ni ĉesas rigardi, ĝi iĝas denove energio. Tio signifas ke dum la plimulto el la tempo, peco de materio ne ekzistas: ĝi estas efektive energio. Se niaj korpoj dum la plimulto el la tempo estas fakte ne materiaj, sed energiaj, oni povus supozi ke energio, kaj energikampoj, gravas al ni pli multe ol provizoraj materiaĵoj.

Sciencistoj kelkmaniere pruvis la ekziston de energikampo ĉirkaŭ ĉiu vivaĵo, kiu restas ĉiam ĉe la vivaĵo, tamen etendiĝas for de ĝi tiom longe kiom oni kapablas mezuri. Tio signifas, ke laŭ spacokupo, la energikampo ampleksas milionoble pli grande ol la materia korpo. Oni mezuris ankaŭ diferencojn inter la energikampoj de diversaj vivaĵoj, depende al ĉiaj faktoroj: specio de vivaĵo, sanstatdiferencoj inter individuoj de la sama specio, kaj eĉ malsamaj pensoj, se temas pri homoj.

Bonan ekzemplon de tio donis la esploroj de s-ro EMOTO Masaru en Japanio. Li fotis akvokristalojn formitajn de diversaj akvoj, kaj malkovris ke kristaloj de poluita akvo aspektas tre malsame ol tiu de pura akvo. Li plu esploris, kaj en unu eksperimento, li metis distilitan akvon en kelkajn glasojn sur kiuj estis afiŝitaj diversaj vortoj, kiaj „amo”, „danko”, „Mi murdos vin”, kaj „Adolfo Hitlero”. La sama distilita akvo, post tranokto en glaso kun unu aŭ kelkaj vortoj sur ĝi, formis kristalon tute malsaman ol tiu de glaso kun alia vorto. Jen grafika pruvo pri la potenco de vortoj! (Artikolo en angla lingvo pri tio, kun fotoj de kelkaj el la koncernaj kristaloj, troveblas ĉe <[www.wellnessgoods.com/art\\_wat\\_messages.html](http://www.wellnessgoods.com/art_wat_messages.html)>.)

S-ro Emoto montris ankaŭ ke ne necesas skribi la vorton sur la glason; sufiĉas *pensi* la vorton aŭ ideon lige al la akvo por aliformi ĝian kristalon. Tio okazas pere de nia energikampo, kiu tuŝas la akvon kaj siavice estas transformata de niaj pensoj. Imagu: niaj pensoj havas la kapablon ŝanĝi la strukturon de akvo. Nu, el kio estas konstruita niaj korpoj? Naŭdek procente el akvo! Kiam ni pripensas tiujn ĉi faktojn, ni venas al la neevitebla konkludo, ke ja povas esti vero en la saniga kapablo de la tielnomataj *kred-sanigistoj* kiuj ŝajnigas sanigi per preĝoj.

Mi volas sugesti alian manieron utiligi ĉi tiun pruvitan kapablon mense influu materion. Mi volas sugesti, ke nian DNA-on, la detalan planaron en ĉiu ĉelo, povus legi la ĉelo mem se ĝi povus ĝin vidi. Sed same kiel ni ne povas memstare vidi nian propran vizaĝon, la ĉeloj bezonas ian spegulon por povi „vidi” kaj legi sian propran planon kaj uzi ĝin por iĝi perfekta ĉelo por sia celo. Ĉi tiu ideo eble sonas iom fantazia, sed mi petas por momento akcepti tion, ke ĝi ekzistas kiel ebleco, kvankam certe ne kiel pruvita fakto. Se ni akceptas ĝin kiel eblecon (tia pensado pri ebloj nomiĝas *pensi* per malfermita menso), ni povas daŭrigi la pensfadenojn jene: Se ni povus trovi taŭgan spegulon por la ĉeloj, ili povus legi la planojn kaj sin ripari laŭ la plano, finfine rekonstruante tute sanan kaj kompletan korpon. Se la spegulo estus sufiĉe taŭga, perfekta sano eblus en ĉia kazo: ne plu ekzistus „nekuracebla malsano”; eĉ mankantaj korpopartoj povus rekonstruiĝi.

Se tio sonas eĉ pli fantazia, bonvolu resti kun mia pensfadeno ankoraŭ iom plu. En la mondo fakte ekzistas tiaj kazoj: kelkaj homoj komplete resaniĝis de „nekurac-

eblaj” malsanoj kiaj kancero, aidoso, diabeto, lupuso, kaj aliaj. Ankaŭ mankantaj korpopartoj rekreskis en iuj homoj. Mi havas amikon de kiu du fojojn oni deprenis kirurgie la tonsilojn, ĉar ili rekreskis post la unua elpreno, kaj nun denove ŝi havas plenajn tonsilojn. La medicino alopata (malsanfokusa), tute ne povas klarigi kial tio okazas. Do, jen ni povas imagi la eblecon ke tiuj „miraklaj” resaniĝintoj iel ricevis spegulon taŭgan por siaj ĉeloj, kaj ili nature sin rekonstruis laŭ la origina plano en sia DNA.

Ĉio tio ĉi povus esti simpla ekzerco de la fantazio, se ne estus alia faktoro: ekzistas grupo de homoj kiuj praktikas ion kion ili nomas „energispiegelado”, referencanta ĝuste tiun ĉi teorion. Ili kolektive jam faris pli ol milionon da speguladesioj por siaj klientoj. Multaj el tiuj sesioj kaj la evoluanta sanstato de la klientoj estas science registritaj. Ĝis nun neniuj aŭtoritataj medicinaj revuoj kuraĝis publikigi la rezultojn de la kelkaj studoj kompilitaj el tiuj registraĵoj, timante ke neniuj kredus. La fakto estas, ke klientoj de tiuj energispiegelistoj ofte spertas „miraklajn” resaniĝojn el ĉiaj malsanoj. Kiam oni rigardas la realajn faktojn pri tiuj resaniĝoj, nia pensekzerco pri la eblo helpi ĉelojn sin rekonstrui per spegulo ne plu estas nura fantaziaĵo. Ĝi estas ĝis nun la plej kredebla klarigo pri realaj faktoj.

Mi mem partoprenis en kursoj pri tia energispiegelado, kaj povas atesti pri mirigaj ŝanĝoj en mia propra vivo. Mi ne havis grandan aŭ „nekuraceblan” malsanon, sed ja plurajn etajn ĝenaĵojn kiuj persistis dum jardekoj, sed post aktiva energispiegelado, aŭ komplete aŭ multe pliboniĝis. Tio inkluzivas alergiojn, dentproblemojn, pulman limiĝon, persistajn jukojn kaj haŭtperturbojn, digestajn problemojn, genuajn difektojn kaj maleolajn vundojn. Ĉe kelkaj el miaj „klientoj” estas pli drastaj resaniĝoj: kancero, diabeto, mensmalsano, deprimado, dentkarno, okulmalsanoj, prostatmalsano. Unu „kliento” eĉ rekreskigis al si uteron, vaginon, kaj ovariojn forprenitajn kirurgie antaŭ jardeko. Ŝi nun estas sesdekjara kaj denove kapablas koncipi!

Oni nomas la metodon „energispiegelado” ĉar la „speguloj” kiujn oni montras al la ĉeloj ne estas videblaj al la homa okulo. (Jen kial medicinaj revuoj ne kuraĝas publikigi la studojn: alopata medicino arbitre sin limigas al la videbla: ĉio nevidebla ne ekzistas, aŭ ne indas je atento.) Oni utiligas sian propran energikampon kiel spegulon por la klienta energikampo. Por taŭgigi sian energikampon al tiu de la kliento, oni komunikas kun la kampo de la kliento, kaj, aŭskultante profunde, sekvas ĝin al tio, kion necesas atenti por taŭge aliformi la terapiistan energikampon. La atento mem, kun plena ĉeesto en la nuna momento, efektivas la speguladon. La spegulo, kaj spegulanto, ne bezonas scii kiel ripari la klienton; ĝi estas nur spegulo kiu ebligas al la kliento vidi kaj legi sian propran planaron. Tial, en realo, la terapiisto faras neniom da sanigado. Tion faras la kliento mem, ĉar nur la kliento havas la detalajn planojn necesajn por efektiviĝi veran riparon.

Pliaj informoj troveblas en la angla lingvo ĉe <[energymirrors.com](http://energymirrors.com)> aŭ <[kotvale.org](http://kotvale.org)>. En esperanto (aŭ angla lingvo) pliaj informoj haveblas de la aŭtoro.

— Joel Brozovsky

904 W Chelan Avenue,  
Spokane WA 99205-3313,  
Usono.  
Rete: betulo@mac.com;  
telefone +1 (509) 325-3957

## KOTURNOJ

De la urbo, Vaŝingtono, venis hero' jen:  
Al Teksas' rapidgalopis la sentima Ĉen,  
pafmurdi la koturnojn — amuza aventur',  
etajn birdojn suferigi, ludo por plezur'.

Ruza Ĉen, riĉa Ĉen, sperta pri la arbusteĵ',  
darfis<sup>1</sup> li la birdojn ĉasi en teksasa kampvepreĵ'.  
Nobla Ĉen, vakera Ĉen, majstro de la birdpafil',  
Eĉ koturnojn li ne timis, fingro ĉe la ellasil'.

Troviĝas hejmo de koturno en tereno de Saturn'<sup>2</sup>.  
Al „heroŝ” timomanka ial venis sortoturn':  
pro saturnismo<sup>3</sup>, ekplumbismo<sup>4</sup> ĉesis la amuzĉasad'.  
Revenu inter la koturnoj idilia pacvivad'.

— Steĉjo

- 
- 1 „darfas” estas neologismo el la germana kiu signifas „kuraĝas” aŭ „rajtigas sin”, tamen sen la senco de kuraĝo.
  - 2 Saturno estis la antikva romiana dio de la kampoj.
  - 3 „Saturnismo” estas malnova medicina termino por malsano pro venenado per plumbo. Unu kaŭzo estis trinkado de vino kiun oni dolĉigis per plumba acetato („sukero de plumbo”).
  - 4 Laŭ malnova teksasa esprimo, la t.n. „plumbismon” oni akiris nek pro vino nek pro akvo el plumbaj tuboj, sed pro kugloj.

Noto de la redaktoro: La poeto ne tiom ŝerc-mokas la paf-akcidenton, la 11-an de februaro, kiam usona vicprezidentino Cheney vundis per birdo-kugletaĵo teksasanon Harry Whittington, kiom li bedaŭras la t.n. sporton de pafado de etaj koturnoj. Parenteze, la angla-lingva traduko de „arbusto” estas „bush”.

